

LA NORDAMERIKA

Esperanto- Revuo

Elwyn Pollock:

**libroj
kaj
rabatoj**



Foto: Scherer

OKTOBRO 1963

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

vol.11, no.7

DONALD BROADRIBB, Redaktoro

Eldonata de la Esperanto League for North America, 808 Stewart Street, Meadville, Pennsylvania, landasocio de la Universala Esperanto-Asocio.

Kotizoj: Abono, \$3; donacabono, \$2.75; Membreco (inkl. abonon), \$5; Studenta membreco, \$3; specialaj membreckategorioj: subtenanta, \$10; patrona, \$20; viva, \$100; kombinita membreco por geedzoj, \$7.



Adresoj: Cion por la Ligo sendu al la adreso donita supre. Komunikojn por la Revuo, librojn recenzotajn, kc. sendu al la redaktoro Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio.

Oficistoj de ELNA: Prezidanto, David Richardson, R.F.D., Box 81, Eastsound, Washington, 98245. Vicprezidanto, Francis Helmuth. Sekretario: Conrad Fisher (adreso de ELNA). Kasisto: John Futran, 601 West 164th St., New York 32, New York. Estraro: William Glenny, Thomas Goldman, Dorothy Holland, Frans Jahger, James Lieberman, Paul Nace, Jonathan Pool, Robert Runser, Roan Stone.

Fakoj de ELNA: Informsekcio ĉe Thomas Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Aŭdvida sekcio ĉe H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Libro-servo, ĉe ELNA. Administracio de la Revuo, ĉe Francis Helmuth, 5615 Beaumont Ave., La Jolla (San Diego), California. Membreca kaj organiza komitato ĉe Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas. Financa komitato ĉe Forrest Turner, 215 S. 3rd Ave., Maywood, Illinois.

Anoncoj: korespondanoncojn ni presas senpage. Aliaj anoncoj kaj reklamoj: \$10 por plena paĝo, \$6 por ½p., \$4 por ¼p., \$2.80 por 1/8p., 15 cendoj por unukolona linio. Sur la 4a paĝo de la kovrilo, anonco kostas 50% pli.

NIA KOVRILO E. Pollock (Elkopo), aŭtoro de la artikolo Rabatu! Rabatu!



INTERNATIONAL CONVENTIONS

U. K.

This summer the second largest international convention of Esperantists in history took place, in Sofia, Bulgaria. Over 3,400 participants filled the halls of the University, for one of the most culturally packed weeks held anywhere in the world. Coming from 45 countries, the Esperantists were welcomed at the opening meeting by the vice Prime Minister of Bulgaria, and the postal system put out a new stamp in commemoration of the convention.

Before the official start of the convention, a week long "pre-convention" was held in Vienna, Austria, with excursions in the Alps.

Among the many highlights of the convention in Sophia were the presentation of Shakespeare's **Comedy of Errors** and Sartre's **No Exit**. An evening of **No-Music** from Japan (played on instruments dating from 1700) brought the East vividly alive. These, and other theatrical events, were professional productions, the Shakespeare presentation being played by actors from the Bulgarian Esperanto Theater and the Sartre play by the International Art Theater. Six lectures in the International Summer University series were given, on "Cultures or Culture?" "Evolution of Bulgarian Literature," "Metaphors, Cliches, and Slang," "A Rational System of Musical Notation," "The Music of Language," and "Results of Mechanical Translation from Russian into Esperanto."

In the literary arts contest, first prize for translated poetry was won by our American member Julius Balbin, for his translation of *Babij Jar* by Evgenij Jevtushenko. First prizes for original poetry, prose, and drama were given to participants from Japan, Italy, and Yugoslavia respectively. Official appearance of the new 710 page edition of Dante's *Divine Comedy* (parallel Italian and Esperanto texts) captured the attention of conventioners, as well as publication of Sartre's existentialist novel *Naŭzo*.


Daily three hour seminars in training teachers for direct - method Esperanto courses were held by Andreo Cseh, author of the most successful international method of teaching Esperanto. Some 300 persons were enrolled in the seminars. A children's convention (6-13 year olds) drew 53 participants, and in their public presentation put on, among other things, the playlet *Najla Buljono* which has just been published by our American member Ella Gibson (see book reviews).

Other items of the convention of special interest were an octet and dance ensemble from Yugoslavia, a student cabaret and chorus from Poland, a folk song group from Denmark, a dance group from Scotland, a jazz orchestra and chorus from Italy. Three new international Esperanto societies were officially formed (Agricultural Specialists; Cinema, Photo, and Tape Amateurs; Anti-Alcoholists). American participants in the convention were given a reception by the American Embassy.

SCHOOLS CONFERENCE

An International Conference of Schools in Which Esperanto is Taught was held at the end of July in Belgrad, Yugoslavia, under the auspices of the Yugoslavian National UNESCO - Commission. 260 representatives from 20 countries took part. Representatives of the Yugoslavian National UNESCO-Commission, the Yugoslavian Institute for School Matters, the Hungarian Ministry of School Matters, the Danish Ministry of Education, the Austrian National UNESCO - Commission, and others were among those attending. Discussions were organized around the following topics: The Contribution of Esperanto to General Education and Instruction; Experiences in the Introduction of Esperanto into the Schools; Improvement and Modernization of Esperanto Teaching; Free Time Activities of Pupils; Current Organizational Problems. A 116 page volume of papers presented was distributed to the participants before the conference began. Esperanto is currently being taught in over 500 schools throughout the world.

INTERNATIONAL CONVENTION



International Conference of Schools

YOUTH MEETING

This year's international convention of young Esperantists was held in Vraca, Bulgaria. It is the custom for the convention to meet in the same country in which the principal international Esperanto convention (Universala Kongreso) is held. 540 youths took part. The convention was opened by the Bulgarian Minister of Education. Highlights of the meeting were excursions, a literary evening, international ball, discussion groups, and Puccini's opera *La Boheme*.

The new magazine published by the World-wide Esperantist Youth Organization, *Kontakto*, made its first appearance in time for the convention. The magazine is to be published quarterly.



new stamp

COMPOUND WORDS

We have been asked about our article in the December, 1962, issue of the *Esperanto Review*: whether it was our intention to state that compound words (e.g., libroŝranko) were incorrect. Compound forms are grammatically quite correct. Indeed, it is difficult to make a clearcut distinction in Esperanto between "compound" and "derived" forms, since all roots enjoy equal status, be they "endings," "affixes" or such terms as "libr" and "ŝrank". Such a term as "libroŝranko" is grammatically quite correct. The purpose of our article was simply to point out that English speakers, because of their English customs, sometimes use long compound forms to the extent that their style suffers.

INTERVJUO KUN E. L. M. WENSING

S-ro Wensing estas tre influa en industriaj rondoj. Li estas Direktoro de la Elektromedicina-fako de la mondkonata firmao Philips.

D - Kiuj estas la ĉefaj motivoj pro kiuj, por la internaciaj rilatoj, vi opinias esperanton pli taŭga ol alia(j) lingvo(j)?

R - Esperanto estas pli taŭga, por internaciaj rilatoj, ol kiu ajn alia nacia lingvo:

a) ĉar ĝi estas absolute neŭtrala, sen iu ajn nacia ŝovinismo, sen iuj ajn lingiloj kun difinita lando aŭ ŝtato;

b) ĉar ĝi estas facile lernebla, facile prononcebla por ĉiuj racianoj kaj perfekte klara en sia esprimkapableco; krome, ĝi permesas al lingvo-lerntaj uzantoj senliman eblecon de vortfarado surbaze de limigita trezoro da vortradikoj;

c) ĝi metas-ĉiujn, kiuj uzas ĝin, sur la saman nivelon, en la saman pozicion, ĉar ĉiuj kiuj uzas Esperanton skribe aŭ parole iam devis studadi la lingvon kiel fremdlingvon. Kiam ia nacia lingvo estas uzata en internacia grupo da personoj, tiuj kiuj parolas tiun lingvon kiel sian gepatran, ĉiam havas grandegan avantaĝon kompare al la aliaj kiuj parolas (aŭ klopodas paroli) tiun lingvon kiel fremdan, pene akiritan lingvon.

D - Kiel spertulo en la komerca kampo kaj kiel vic-prezidanto de UEA, vi certe konas la nuntempan situacion de la disvastigo de Esperanto precipe en la kampoj komerca, industria kaj turisma - ĉi ĝi estas?

R - Bedaŭrinde, kaj fakte nekompreneble, Esperanto estas ĝis nun malmulte uzata en la kampo de la internacia komerco kaj industrio. Estas kelkcentoj da firmaoj en la mondo kiuj okaze utiligas la lingvon sed ĝia grado de disvastiteco

estas sensignifa kompare al ekzemple la angla lingvo. En la propagando-agado de internacia turismo ĝi estas iomete pli uzata, sed, ĝenerale parolante, oni povas diri, ke Esperanto ankoraŭ ne trovis la grandan agnoskon, kiun ĝi plene meritas en la kampo de la praktika, publika vivo. Laŭ mi, tiu fato estas precipe atribuebla al la antaŭa sinteno kaj la ĝisnunaj labor-kaj propagandmetodoj de multegaj samideanoj, kiuj vidis la lingvon kiel pac-instrumenton, konsideris la movadon kiel idealisman agadon kun fortaj homaranaj tendencoj kaj tute forgesis emfazi la grandegan praktikan valoron de la lingvo.

Per idealismaj frazoj oni eble altiras milojn da homoj, sentemaj kaj profundanimaj etikuloj, sed certe ne la miliojn, kiuj perlaboras la ĉiutagan panon en la dura vivo de la komerco. Tial Esperanto estas, ankoraŭ hodiaŭ, ofte konsiderata de la ekstermovada mondo kiel senkulpa infanludo de malreale pensantaj idealistoj. Estas ĝuste tiu opinio kiun ni, praktike agantaj Esperantistoj, devas ĉiel ataki, kontraŭargumenti kaj kontraŭbatali per nia praktika ekzemplo. Bedaŭrinde, ankoraŭ hodiaŭ, ekzistas multaj « verdstelanoj » kiuj ŝatas « marŝi en verdaj pantalonoj » kun pacvortoj en la buŝo laŭte trumpetante ke « la homaro kunigos en unu granda gefrata familio » pere de Esperanto. Tio estas sensencaĵo, kiu ege malutilas al la seriozeco de Esperanto.

EL L'ESPERANTO

Maggio - Giugno 1963

Elkopo:

RABATU!

RABATU!

En la nuntempa freneza mondo usoná, io unika okazas, kio — iom post iom — detruas certan integran karakteron de la amerika popolo. Mi diras "integran" ne certe, ĉar, almenaŭ surŝafce, la amerikano karakterize emas al marĉandado, kaj kion ni nomas "Yankee" liberkomercisto estas tipe amerika. Tute kontraŭe, tamen, ekzistas nenia rilato inter tiu tipa komercisto en Usono kaj la nuntempa marĉandemeco de la usona amaso. La tielnomata Yankée-komercisto estas konstanta parto de la evoluo de la kapitalista sistemo, kaj bone aŭ malbone, ne rilatas al la freneza nuntempo, kvankam oni deklaras ke tiu ĉi nuntempa periodo estas neevitebla rezultato de la kapitalismo. La Yankee-komercisto ĝismedole prezentas Usonon mem en si. Aliflanke, la emo al rabat-marĉandado detruas la legitiman kaj fundamentan bazon de komercaj organizoj tra Usono, kaj originas el nova fenomeno en Usono (kaj speciale Kalifornio).

Ĉar mi ne plu estras la "Esperanto-Libro-Servon de Usono" (la originala titolo), mi povas tute funde kaj libere pároli, sen la danĝero, ke oni akuzos min esti avarulo. Samtempe, mi devas konfesi, ke mi povas marĉandi egale bone kiel iu alia, en butikoj kie oni jam delonge kutimiĝis al tia formo de negoco.

En lombardejo, ekz., se oni hazarde estas la unua eniranta la butikon dum lunda mateno, estas fundamenta principo, ke la lombardisto faru vendon, ĉar tiu vendo nepre bone aŭguras por la tuta semajno. Ne gravas, ĉu li perdos monon per la unua vendo. La vendo mem estas la grava afero!

Se oni tute komprenas tion, oni povas fari amuzan ludon, kaj ŝakri kaj marĉandi ĝisgatte!

Tio ja ne rilatas al la rabat-komercejoj, kiuj, profitante per la avareco de la rabat-konacia usonano, jam establis rabat-butikojn en ĉiuj grandurboj. Domaĝe, oni sentas la neceson negoci ĉe ili, kvankam multaj el la varoj estas de malsupra kvalito, kaj do, kvankam pli malkara ol la kutima prezo en

legitima butikoj, nepre donas malgajnon al la aĉetinto.

Oni ankaŭ devas konstati, ke la ĝenerale altaj prezoj de amerikaj varoj akcelis la kreskon de rabatejoj, ekstraĵoj, ktp. Tamen, oni ja iomete gajnos pro tiu akcelo, ĉar ĝi jam kelkokaze kaŭzis malaltigon de kutimaj usonaj prezoj, kaj espereble ni fine atingos ian egalecon. Almenaŭ evidentiĝas la tendenco. Tamen, ĉi tiu fenomeno, kiu nun persistas, ankaŭ malbone efikas je la esperantistoj en Usono.

Ekz., se oni ne povas ricevi rabaton en la aĉeto de esperanta libro, oni ĝin ne aĉetas, aŭ serĉas alian fonton, kie taŭga rabato estas ricevebla. (Ĉe esperanta pikniko, antaŭ nelonge, kliento diris al mi — kiam mi demandis, kial li ne plu mendas ĉe mi — ke li povas akiri pli bonan rabaton de alia libro-servo. Mia 15%a rabato ne sufiĉis!) Kara leganto, bonvole konsideru momente ĝuste kion tio signifas rilate al la esperantaj libro-servoj en Usono. Vere, oni ne plu povas funkciigi libro-servon per ĝia propra forto! Aĉetante librojn pogrande, oni ricevas 25%-35% da rabato (tre malofte, 40%). Oficprovizajoj, poŝtmarkoj, papero, ktp. (ĉe ne konsideru la tempon!) forrabas la plej grandan parton de la rabat-procento. Se oni donas 10%an rabaton por malgrandaj, kaj ĝis 25% por grandaj mendoj, kiamaniere oni povas restoki la libro-servon?

Lastatempe mi trovis, ke ne estis eble daŭrigi, sen pagi la elspezojn el mia propra poŝo! Do, iom post iom, la libro-servo fariĝis nefunkciebla, je kontentiga nivelo, kaj pro tio la Esperanto-Libro-Servo ĉe 2222 Crest Drive, El Cajon, California ne plu ekzistas.

Jen do mia argumento: se ni estas esperantistoj laŭvole kaj ĝisoste, ni ja deziras, ke Esperanto floru kaj kresku en la nuntempa mondo. Preskaŭ ĉiuj elkore konsentos pri tio. Do, por validigi la internajn sentojn, kiam ni ree aĉetos novajn Esperanto-librojn, anstataŭ postuli rabaton, sendu la podetalan prezon al la libro-servo, kun la

necesaĵoj postmarkoj por transsendi ilin, kaj notu bone la diferencon. Ĝa sumiĝos al nur kelkaj ĉendoj, sed kiom da bonvolo rezultigos! Ĉu tiu estas ne la plej grava diferenco? Oni devas lasi al la aĉetantoj mem decidi, ĉu tio efektive fariĝos kutimo ĝenerala inter ni. Memoru ankaŭ, ke libroj estas la viv-sango de nia lingvo — de ĉiu lingvo — kaj aĉeti libron ĉiumonate estu nia konstanta principo!

Lernu



VortoJZ

Laŭnecese, se oni instruas klason kaj bezonas mendi kvanton da lernolibroj, la librovendisto mem—senpete—donos sufiĉan rabaton al la instruisto, por ke li vendu al la klasanoj podetale, ĉar ofte okazas, ke li ne vendas ĉiujn, kaj tiuokaze la perdo ne iĝas tro granda.

Mi mem ĵuras, ke aĉetante novajn esperantajn librojn, mi ĉiam pagos la kutiman podetalan prezon, kaj tiamaniere helpos per fundamenta kaj firma maniero la pluan funkciadon de la Esperanto-libro-servoj de Usono.

Kreskigu do viajn Esperanto-bibliotekojn, por ke vi fieru pri ili. Estas ĝojiga afero, montri al skeptikulo imponan libraron en Esperanto. Mi mem bone scias pro tio. Kaj vi?

Impress

PRELIMINARY

ESPERANTO EXAMINATION NOW AVAILABLE

A diploma will be awarded to every Esperantist who passes the preliminary examination now being offered by E.L.N.A. The test is designed for anyone who has completed a beginners' course or an introductory textbook.

If you wish to take such an examination, send \$1.00 to the address below, together with the name and address of a teacher who is willing to administer the test. Send to:


Ges-roj ROY HOLLAND,
1976 Greenview Drive,
Fayetteville 1, Arkansas, 72701.

The examination and complete instructions will be mailed to the administrator, who will return the completed test to the above address, where it will be corrected.

1. Ĉu kepo estas
 - a. ĉapo, portata de soldatoj, lernantoj, kc?
 - b. legomo kun akra gusto?
 - c. ĉefkuiristo?
 - ĉ. direktoro de granda firmo.
2. Ĉu sacerdoto estas
 - a. sankta akvo uzata en budhista templo?
 - b. speco de sukero, kun tre delikataj grajnoj?
 - c. katolika pastro?
 - ĉ. donaco okaze de la naskiĝo de infano?
3. Ĉu trabo estas
 - a. interŝanĝo de varoj?
 - b. tropika vento?
 - c. peco de ligno, subtenanta konstruaĵon?
 - ĉ. insekto kiu produktas lumeton?
4. Ĉu sinkopo estas
 - a. speco de delikata papero?
 - b. parto de la dorso?
 - c. mezurunuo?
 - ĉ. subita sveno?
5. Ĉu kolegio estas
 - a. universitato?
 - b. grupo de personoj fotografotaj?
 - c. muzika instrumento?
 - ĉ. aĉetanto en butikoj?
6. Ĉu kontrabaso estas
 - a. muzika instrumento?
 - b. sekreta importado de varoj?
 - c. tre alta kantvoĉo?
 - ĉ. parto de la okulo?

Respondojn trovu sur la tria paĝo de la kovrilo.

FOIRA AGADO



en
Walla Walla

&
San
Mateo



Fari aŭ ne fari?

Ankaŭ sufiĉe multaj jaroj, kiam mi ankoraŭ estis knabo, mi ekaŭdis la vorton „Esperanto” kun aldoña neglekta „klarigo” — „iu mispensita internacia lingvo”. Malgraŭ tiu kritiko mi ekinteresiĝis pri tiu lingvo, kiu laŭdire estis facila kaj ie parolata eksterlande. Mi volis ellerni ĝin por korespondi kun la mondo kaj interparoli kun mia amiko (li ankaŭ estis devonta ĝin lerni) nekomprene de flankuloj. Kaj ĉu vi scias, gesamideanoj, kiom longe mi ne povis trovi eĉ unu spuron de esperantistoj — n-u-r-dum kvar jaroj!! Sufiĉe, ĉu? La kaŭzo de tio estis kompreneble manko de informado. En tiu periodo ĝi estis pli komprenebla, ĉar ĵus finiĝis la terura mondmilito, kiu detruis ĉion en mia lando, do, ankaŭ Esperanto-movadon. Sed ni pripensu iomete, ĉu nun, en periodo, kiam la movado rekonstruiĝis kaj fortiĝis, kiam videble kreskis la ĝenerala aprezado de Esperanto, ĉu nun la persono, kiu hazarde en neesperantista societo eksciis pri Esperanto, havos facilan vojon al la lingvo?

Kaj de alia flanko — ĉiu konvinkita kaj pli malpli aktiva samideano havas certe similan sperton. Vi diskutas pri Esperanto kun iu klera persono, kiu estas kontraŭ ĝi. Trankvile kaj sen trudado vi nur elektas faktojn, informojn pri ĝisnunaj aplikoj de la lingvo, ne implikiĝante en fantaziojn pri estonteco. Kaj vi observas, ke iom post iom la mieno de la kunparolanto ŝanĝiĝas. Malaperas la ĝentila rideto, montriĝas interesiĝo, aŭdigas jam seriozaj demandoj kaj fine via konatulo diras malkaŝe, ke li nenion sciis pri ĉiuj ĉi aferoj, ke ili estas vere interesaj kaj ke tiuj informoj grave ŝanĝos lian opinion pri la internacia lingvo. Eble eĉ, se li trovas iom da tempo, li provas almenaŭ supraĵe konatiĝi kun ĝi. Kaj tiam oni sentas sin venkinto.

En similaj okazoj mi pensas, ke tia „venko” estas tre facila — sufiĉis plenumado da ĝuste elektitaj informoj! Kaj ĉeokaze aperas alia penso — kiom malpli da kontraŭuloj havus Esperanto, se ili ĉiuj pli facile, pli normale, nebezonzante atendi renkontiĝon kun esperantisto, povus trovi interesajn por ili informojn pri Esperanto? Ĉu vi ankaŭ konscias tion, gesamideanoj? Se jes, mi jam havas alian demandon. Kaj do — kial la homoj estas iom nesufiĉe informitaj koncerne Esperanton pri la faktoj. Pri tiuj faktoj, kiuj estas nekontesteblaj kaj pri kiuj komence multaj eĉ ne kredas. Ekzemple, ke ekzistas internaciaj familioj uzantaj en sia hejmo sole Esperanton. Pri ĉi tiu demando

respondo estas jena — la neinformitecon de la socio pri Esperanto kaŭzas manko de sufiĉaj informrimedoj kaj metodoj en la Esperanto-movado. Kaj bedaŭrinde tio ne estas malvera. Nermalvera, tamen ankaŭ ne tute ĝusta. Estas fakto, ke la esperantista gazetaro havas amatoran ĉarakteron pro la manko de necesa financa bazo. Same, tie kaj tie organizitaj Informaj Faktoj aŭ Gazetaraj Servoj — kun kelkaj brilaj esceptoj, ekzemple tiu de la Itala Servo — laboras malvigle kaj malrapide, ĉar ili estas priservataj de volontuloj dum sia libera tempo, ne havas sufiĉan teknikan bazon kaj ankaŭ al ili mankas fontoj de informoj! Sed tute certe eĉ ĉi tiuj limigitaj helpoj pri informado ne estas sufiĉe utiligataj de esperantistoj. Kaj des pli kelkaj aliaj informeblecoj troviĝantaj ekster la Esperanto-movado. Ili estas: naciaj novaj-agentejoj kaj gazetoj montrantaj interesiĝon pri la lingvo kaj movado kaj dediĉantaj al ĝi eĉ apartajn rubrikojn aŭ anguletojn; naciaj radiostacioj kiuj elsendas kaj eĉ ne elsendas en Esperanto, sed volonte aŭdigas interesajn por ili informojn pri ĝi; sciencaj revuoj, kiuj publikigas resumojn en Esperanto aŭ ne publikigas, sed ofte volonte presas informojn kaj simplajn anoncojn por sia legataro pri apliko de Esperanto en ilia sciencobranĉo; komercistaj kaj turismaj publikaĵoj kiuj ofte faras la samon. Verdire tiuj ebloj prenitaj kune estas neatendite grandaj. Kaj ili ĉiuj ne estas sufiĉe utiligataj pro unu sola kialo — manko de aktuala informmaterialo! Mi aŭdis pri nek unu redaktoro de Esperanta redakcio, anguleto, aŭ rubriko, kiu ne plorus per amaraj larmoj, ĉar ĉiam mankas al li freŝaj informoj pri esperantaj okazintaĵoj. Ĉu tiaj okazintaĵoj ne okazas? Tute male, ili estas multegaj kaj pro iu tute nekomprenebla kaŭzo ili estas prisilentataj eĉ de la organizantoj kaj partoprenantoj. Mi mem renkontis dekojn da tiaj situacioj, kiam pri iu tre interesa kaj sukcesa aranĝo, kies preparo postulis multe da laboro, oni menciis nur en loka bulteneto.

Esperantistoj ne scias „vendi” siajn akiraĵojn? Nekredeble. . . . Kaj la afero estas tiel simpla. En kelkaj frazoj noti ĉiujn faktojn pri aranĝo aŭ okazintaĵo, kaj eĉ per simpla poŝtkarto sendi ĝin al ĝusta redakcio, ĉu eĉ al kelkaj. Vi tute ne devas zorgi pri bela formo de la informo, ĉar por tio estas ja redaktoroj. Pli gravas la aktualeco de la informo kaj ĝia detaleco.

Heroldo de Esperanto

l e t ' s t a l k i t o v e r

In Acts a miracle is described in which a crowd, composed of Parthians, Medes, Cretes, Arabians, Elamites, and dwellers from many other places heard a sermon, and to each man it seemed spoken in his own tongue, and he understood and was converted.

Whether or not you believe in miracles is irrelevant. The point is that once people heard a message delivered in familiar words, important things happened. If Esperanto were taught everywhere today, the miracle of Pentecost might be repeated again and again.

There is a strangeness, a feeling of being alien in unfamiliar places. Anyone who has moved to a new town, a new neighborhood, or started in a strange school has sensed it. That situation, happily, is corrected in a few days, weeks or months. But imagine that feeling magnified a thousand times by a language barrier; a feeling that may persist, perhaps for the lifetime of the individual.

Parents who desire the fullness of life in all its aspects for their children should encourage them to study Esperanto. True, culture is already exchanged between nation and nation: Committees and chairmen and bureaus and the like are very, very busy arranging for our enlightenment and entertainment. But didn't you ever feel the atavistic urge to explore for yourself the places beyond the horizon? With a knowledge of Esperanto, this dream can come true. Friends would exist everywhere, anxious to establish rapport, whether your interest lie in the native lore of the Amazon Indians, or philately; and for the lucky ones able to travel, the world would truly become alive.

Even when one is fortunate enough to know a foreign language, and strives to talk in it, an accent often hampers facile comprehension on the part of the listener—unless, of course, you are one of those individuals with an "ear" or a "flair". Esperanto, with its phonetic spelling and accent on the next to the last syllable, doesn't require an aptitude for languages. It simply requires someone else who speaks it too.

And think, Esperanto in your school would make current events, geography, etc., living, breathing subjects. If children can write to children in other lands, intimate friendship can develop, and a feeling



EL VRACA kun AMO

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al TEJO

El ĉiuj TEJO-kongresoj ĝis nun, tiu en Vraca estis — laŭ JEN-a termino — la plej gruva. Kolektiĝis en Vraca pli ol 500 gejunuloj, ne nur el Eŭropo sed ankaŭ el Japanujo (venis du reprezentantoj de la ĵusfondita japana TEJO-sekcio), el Malio, el Israelo, kaj el Usono. La unuan fojon en la historio de TEJO oni povis nomi ĉi tiun Junularan Kongreson vere internacia.

Kaj ĝi estis la plej granda TEJO-kongreso ĝis nun: venis kiel kutime la gvidantoj de TEJO kaj de ties naciaj sekcioj, sed venis ankaŭ al Vraca multaj reprezentantoj el orientaj landoj — precipe Pollando, Hungarujo, kaj Jugoslavujo. Estis eĉ po unu reprezentanto el Ĉekoslovakujo kaj Sovetunio — kvankam grupo el Rumanujo kiu antaŭe sin anoncis estis malhelpata veni.

La multnombreco de la kongreso kreis apartan etoson: ĝi ne estis tute simila al la kutimaj centpersonaj TEJO-kongresoj, ĉe kiuj oni konatiĝas kun ĉiuj, kaj plejparte vivas kiel grupo. En Vraca eĉ la lastan tagon oni ankoraŭ vidis vizaĝojn de homoj kiujn oni antaŭe ne vidis, kaj memori multajn nomojn estis evidente neeble...

La programo, preskaŭ perfekte organizite de la Kongresa Komitato (kontraste kun la dumkongresa kaoso kiu atendis nin la postan semajnon en Sofio), estis brila manifestacio de la forteco kaj internacieco de TEJO. La oficialan inaŭguron ĉeestis gravaj reprezentantoj de la reg-

istaro — salutis homoj el preskaŭ ĉiu sekcio de TEJO — venis telegramoj (i.a. de JEN) kaj salutleteroj — optimisme parolis la gvidantoj de TEJO — entuziasme reagis la ĉeestantaro.

Tiun saman posttagmezon okazis la oficialaj kunsidoj de la Komitato de TEJO. La kongresoj de VRACA kaj Sofio tiel ŝanĝis la vizaĝon de TEJO — rezulte de ĝiaj propraj kunsidoj kaj kunsidoj kun UEA — ne nepras aparta pritraktado de la labora flanko de la kongreso.

La kongresaj aranĝoj sekvis la inaŭguron laŭ brila vico dum la tuta semajno: la internacia balo, sportaj konkursoj (kun i. a. iom karnavala futballudo inter tutgermana teamo kaj teamo el Ruse, Bulgarujo, en kiu venkis ...Ruse), subĉiela vespero, belarta vespero, ekskursoj, vizitoj al lokaj entreprenoj, eĉ opero — kaj, kompreneble, la ĉiujgra elekto de Miss Esperanto. Ĉijare la krono iris al knabino el Hungarujo, kiu, laŭ la ĉiamaj "spertuloj" kiuj meditaĉis super la kafo ĉe la tabloj de la restoracio kie okazis la elekto, estis la ankaŭ la plej...gruva Miss Esperanto ĝis nun. Okazis ankaŭ tri diskutaj grupoj pri la temoj "Ĉu kontraŭmilitaj kampanjoj vere efikas?" "Grandaj kaj malgrandaj popoloj," kaj "Kien iras Afriko?" La du lastaj bonege sukcesis: okazis vere vigla interŝanĝo de ideoj inter okcidento kaj oriento — kaj inter ĉiuj ĉeestantoj kiel individuoj.

Kiel en ĉiu aranĝo tiel grandskala, ankaŭ la kongreso en Vraca havis siajn makulojn. Mi-tingo kun la loka junularo estis farsa malsukceso por granda parto

de la kongresanoj, kaj tiu kaj unu-du aliaj aranĝoj - ekzemple la unua diskuta grupo - suferis pro manko de antaŭpreparo.

Sed malmultaj kongresanoj forgesos la belan gastaman Bulgaron, la stelplenajn noktojn, la konversaciojn, la novajn amikiĝojn, la interŝanĝojn de spertoj. La ĝenerala verdikto de ĉiuj kongresanoj estis nur jena: se dum estontaj jaroj povos okazii kongresoj de TEJO tiel multnombraj kaj tiel brile organizitaj, TEJO ne nur certigos la floran estontecon de la Movado - ĝi estos la movado! Kaj, finfine, TEJO, vi komprenu, gruvus

....

TEJO Perspektive

Dum la 19a Kongreso de TEJO, en Vraca, la Komitato kunsidis preskaŭ ĉiutage dum entute ĉirkaŭ dudek horoj dum la semajno: krome en Vraca kaj en Sofio la Estraro aparte kunsidis plurfoje, kaj estraranoj de TEJO ĉeestis kunsidojn de la Financa Komisiono kaj la Estraro de UEA. Sekve de tio ĉi okazis pluraj gravaj ŝanĝoj en la strukturo de TEJO.

Ĝis nun, TEJO estis Junulara Sekcio de UEA pli laŭnome ol laŭfakte. Ĝi ricevis ĉiujare de UEA malgrandan subvencion, sed kunlaboro, pro mankoj ankaŭ en TEJO, estis relative minimuma. Tio estas bedaŭrinda, sed oni devas fronti la realon....

La Estraro de TEJO, konstante ĉi tiun malkuraĝigan situacion, antaŭ unu jaro komencis ŝanĝi ĝin. Je ĉiuj paŝoj ĝi renkontis ne la reziston de UEA kaj la ĝenerala esperanta movado, sed helpemon, konsilojn kaj materialan subtenon. Rezulte de tio,

TEJO dum nur unu jaro leviĝis el sia eta kampo en unu angulo de la movado kaj komencis vere tutmonde labori.

Kiel daŭre emfazis la ĉefuloj de TEJO ek de la komenco de la Jaro de la Junularo (kampanjo multeflanke helpata de UEA), la junularo sopiras ne sendependecon sed ligitecon al la ĝenerala movado — almenaŭ je internacia nivelo. Tiucele la Estraro de TEJO kunmetis novan planon por pli intimaj rilatoj inter UEA kaj TEJO. La koncerna funkcio de UEA al kiu la plano estis prezentata malakceptis ĝin kaj... proponis ion eĉ pli radikalan!

Tiun pli radikalan planon unuanime akceptis la Estraro de UEA, kaj per granda plimulto ankaŭ la Komitato de UEA ĝin akceptis. La plano profunde ŝanĝas ankaŭ la kotizan strukturon de UEA. Ek de nun:

- Ĉiu Membro-Abonanto de UEA sub la aĝo de 25 jaroj ricevos sen pago la gazeton de TEJO "Kontakto."

- UEA pagos al TEJO procentaĵon de ĉiu kotizo kiun ĝi ricevas laŭ la kategorioj JMA (Juna Membro-Abonanto) kaj MJG (Membro kun Junulara Gazeto - la nova kategorio por MA-oj ĝis 25 jaraĝj).

Ĉi tiu plano donas al TEJO investon en la bonfarto de UEA kaj inverse. Nur se UEA havos multnombrajn membrojn en la ĝustaj kategorioj TEJO bonfartos, kaj same UEA bonfartos. Estas nun rekte laŭ la intereso de TEJO varbi membrojn por UEA.

La unuan numeron de "Kontakto," la nova junulara gazeto de TEJO, oni prezentis ĉe la kunsidoj de la Komitato de UEA en Sofio. Temas pri provnumero: la gazeto aperos regule kvarfoje

TEJO

jare ek de la venonta printempo. Tiu provnumero estas aĉetebla kontraŭ unu guldeno (30 cendoj) de la administracio de la gazeto: Kontakto, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando. Jarabono kostas 8 guldenojn (du dolarojn kaj 15 cendojn): oni akceptas usonajn ĉekojn.

Do, ĉu ĝis nun sukcesis la Jaro de la Junularo? Laŭni temas simple pri - Jaro de Triumfo!

- La venonta kongreso de TEJO okazos en Amsterdam dum la semajno post la Universala Kongreso. Oni esperas ke almenaŭ kelkaj usonanoj ĉeestos. Detaloj estas haveblaj de la redaktoro de ĉi tiu artikolo.
- La Estraro de TEJO petis al ni danki al ĉiuj usonanoj kiuj kontribuis al la fondaĵo Junulara Gazeto kaj tiumaniere certigis la aperigon de "Kontakto" dum la venonta jaro. Ni aldonu ke la Fondaĵo estas ankoraŭ malferma por kontribuadoj - kiujn oni eventuale sendu al la CO de UEA en Rotterdam aŭ al la Kasisto de TEJO.
- Lastatempaj novaĵoj raportas pri peto de la Korea Junulara Esperanto-Asocio por aliĝo al TEJO. Tio estos la 17a sekcio de TEJO. En Hungarujo oni ankaŭ komencis esploran laboron cele al fondo de sekcio.
- Post la Kongreso en Pittsburgh, JEN povas raporti konsiderindan kreskon de sia membronombro. La membraro nombri 110 fine de septembro kaj daŭre kreskas.

Ĉi tiun artikolon redaktis por la Revuo Humphrey Tonkin. Ĉion por la JEN-redakcio kaj komunikojn por JEN oni sendu al ĝia oficejo ĉe 30 Avenue B., New York 9, New York.

ALDONU AL LA LISTO DE GAZETOJ RICEVITAJ:

Oomoto - majo-junio
La Revuo Orienta - aŭgusto
Esperanto-Agado Martin-Jikhlava, januaro-marto, aprilo-junio
Nederlanda Esperantisto, junio, julio
Sennacieca Revuo - numero 91
La Internacia Fervojisto, juni-aŭgusto
Lerneja Esperanta Revuo - julio
Pli, numeroj 1 kaj 2
Naturista Vivo - septembro
La Espero - junio-julio
Nova Civito - majo-junio

Edmond
Privat

Dum mia skizo pri Doktoro Edmond Privat estis presata, la 12.9 mi ricevis de S-ino Yvonne Privat donace la belan libron "Aventuroj de Pioniro" de D-ro Privat, menciitan en sia unua letero adresita al mi. Tiu ĉi novega Stafeto-libro kun multaj valoraj bildoj detale rakontas pri la brila kariero de la mortinto. Tiu ĉi fakto estas nepre aldonenda al mia skizo pri D-ro Privat aperinta en la septembra numero de la Revuo.

Armand Su

ASPEKTOJ DE TEJO EN VRACA



of kinship arise. Too, just the psychological fact that folks all over the world are engaged in the same endeavor as ourselves can serve to unify, to harmonise, and humanize all sorts and conditions of people. The "togetherness" they talk so much about, now-a-days, what a lovely experience in "togetherness" that would be!

Age need be no detriment in mastering the world language. One summer my five-year-old nephew played a great deal around a group of Mexican workmen, and was soon picking up Spanish phrases. I tried in vain to copy the liquid syllables that he pronounced as fluently as the Mexicans themselves. Before succumbing entirely to auntly pride, realization came to me that the child, with his spastic young mind, was merely repeating the process he had gone through only a very few years before when he learned his mother tongue. But I couldn't do it. Many adults cannot.

People who advocate English as a world language ought to be told that a course in Esperanto would shorten the arduous years most people find necessary for their study.

Have you heard of "Yankee imperialism"? I have — all my life, and the feeling still persists in our neighbors to the south. What a charming, what a gracious gesture, to meet them on the grass roots level with a common language. Might they not say: "Those Yankees, they are not so arrogant after all. Though luckier, stronger, and richer than we, they come halfway to meet us. Begin at the grass roots level, but turn it into a grass fire, a prairie fire of enthusiasm. This is my earnest desire.

Some dread day we may again hear the cry, "The time for talking is past!" — the modern war whoop. Why not change it to "The time for talking has just begun!" — talking in Esperanto.

By all the ideals we cherish we should not disregard the obvious just because it is obvious. As long as human greed and human selfishness prevail, Esperanto is not a cure all, but it would be a wedge. Can we afford to throw away wedges as casually as we flick cigarette ash over our shoulders?

I ask myself, what a middle-aged woman with no experience, only average intelligence and average education, can do in this world to help prevent holocaust. I can learn Esperanto, and perhaps, like the sower that went forth to sow, the seed may fall not in thorns or on rocks, but in good ground.

Mrs. GERTRUDE EADS.

JUNULA HUMORO

Zdzisław Podtrzcinski

Ni esperu, ke postnelonge la Universala Esperanto Asocio (UEA) ekstaros en vico de la specialigintaj organizaĵoj de UNO kaj titoliĝos per mallongigo ISOE, kio kompreneble signifos: Internacia Specialiginta Organizaĵo pri Esperanto aŭ Internacia Specialiginta Organizaĵo pri Enspezoj. Jes, UEA lastatempe specialigis pri enspezoj, kio povas nin nur ĝojigi, ja — sen mono kion eblas fari.

Jen lastatempe UEA aĉetis novan domon. Kutime fakto de aĉeto kaŭzas neceson elspezi, ĉe UEA kontraŭe — ĝi kaŭzas enspezon. Oni anoncis: kiu deziras por ke iu ĉambro por eterna tempo portu lian nomon, pagu minimume 5000 nederlandajn guldenojn.

La ideo plaĉis al mi. Ĉu estas pli bona okazo monumentigi mian nomon por mi — 70 jarulo? Mi do enpagis, kaj atendis.

Evidentiĝis, ke unu artistaĉo, kiu estis devinta ĉizi en muro mian nomon dubis, ĉu ekzistas homo kun tia nomo kaj ĉu ekzistas homo, kiu povus tiun nomon prononci. Indignige! Ho, pardonu, mi ankoraŭ ne prezentis min — Zdzisław Podtrzcinski mi estas, mia nomo — Podtrzcinski. Kiu ne povas prononci tion?

Mi protestis ofendita kaj postulis starigi specialan komisionon. Sed la sorto estas kontraŭ mi. Hazardo faris, ke ĉiuj komisionanoj estis balbutantoj. Komisiono gloris, ke la ĉambroj en la Internacia Domo devas havi prononceblajn nomojn, kaj en la polaj inter unua silabo kaj la lasta „ski” kutime aŭdiĝas multe da neprononcebla balbutado.

La Komisiono proponis:

1. Kompletigi la nomon per iom da vokaloj (Po-do-to-ro-zo-cin-ski);
2. Ŝanĝi la nomon;
3. Redoni la monon.

Neniu el la proponoj plaĉis al mi, sed mi rekonas demokratajn principojn. Nur la dua propono ŝajnis al mi akceptebla. Mi sendis do al la komisiono vortaron de la pola lingvo, por ke ili elektu por mi nomon prononceblan por ĉiu. La komisiono post longaj debatoj elektis la vorton „baran” substrekante ĝiajn belsonecon kaj inter-

naĉiecon. Evidentiĝis, ke ĝi samtempe laŭsone ŝajnas imiti francan, anglan kaj hispanan lingvojn.

Komence mi indigniĝis, sed denove venkis denaska demokrateco. Mi konsentis... Tiamaniere le plej bela ĉambro en la nova domo de UEA (unua etaĝo, dua de la ŝtuparo dekstren) portas nomon:

J A N B A R A N

tio signifas — ĝi havas mian nomon.

Ĉu vere la posteuloj sentos, ke Jan Baran estas mi?

Kaj se la ĉambro portus nomon ZDZISLAW PODTRZCINSKI, ĉu tiam ili sentus alie?

R. DOBRZYNSKI

(El „Pola Esperantisto”)

En la brita parlamento

Demando pri „Basic English”


Respondante, nome de la registaro, al unu deputito, la ŝtatssekretario Robert Carr anoncis la 21-an de majo en la brita parlamento, ke la „Basic English” (lingvo-projekto aĉetita de la ŝtato laŭ propono de W. Churchill) ne plenumis sian rolon de internacia komunikilo. Laŭ la ŝtatssekretario Carr, ĉiuj preferas lerni la normalan anglan lingvon ol ian korektan, sed senambician anstataŭon.

Kiel oni scias, „Basic English” estas simpligita angla lingvo kunmetita de C. K. Ogden. Ĝi konsistas el 850 plej utilaj (kvankam ne plej oftaj) vortoj de la angla vortaro. Per tiuj 850 vortoj Ogden pretendis traduki la plej malfacilajn tekstojn. Fakte, ekzistas en „Basic English” traduko de la Nova Testamento. La verkisto H. C. Wells iam asertis, ke inter la jaro 2000 kaj 2100 la „Basic English” fariĝos diplomatia lingvo kaj ke ĉirkaŭ la jaro 2200 preskaŭ ĉiuj parolos ĝin.

La ĉefa obstaklo, kiun la „Basic English” renkontis, devenis de ĝia malriĉigita vortaro. Praktike, Ogden proponis anstataŭi la malfacilajn vortojn per ilia difino; sed estas pli facile pliriĉigi sian vortprovizon ol limigi sian penson per malgranda nombro da esprimoj.

El Heroldo de Esperanto

LIGAJ A Jeroj N!



Poŝtmarka Kolektado

Mi deziras danki la jenajn personojn, kiuj sendis poŝtmarkojn por subteni la varbagadon de Tibor Sekelj:

Donald Parrish—Los Angeles, Calif.
J. Regal—Downers Grove, Ill.
B. Engel—Brooklyn, N.Y.
Rene Oehler—Milford, N.J.
Esperanto Club of St. Louis.
J. Lieberman—Bethesda, Md.
J. A. Downs—Greenville, Pa.
Helen Larson—Seattle, Wash.
Esperanto Club of the Lehigh Valley.

MARCELLA YUHASZ,
170 Oak St.,
Meadville, Pa., 16335.

ELNA-membro Alonzo C. Scurlock, de Dallas, Texas, preparis specialan broŝuron pri Esperanto, kaj dissendis 900 ekzemplerojn al la partoprenantoj de la Anglikana Kongreso (en aŭgusto), en Toronto, celante veki subtenon por poresperanta rezolucio.

ELNA denove estas listita en Chase's **Calendar of Annual Events**. La listigoj inkludas: la kongreson de ELNA, la naskiĝtagon de Zamenhof, la datrevenon de la unua esperanta libro. La libro kostas \$1.00. Menu de Apple Tree Press, 2322 Mallery St., Flint 4, Michigan.

Special Appeal: The following issues of our REVUO are missing (or probably lost in the mass of other things) from our files. We shall appreciate receiving unwanted copies from readers: 1956—January-February and July-August; 1957—July-August and September-October; 1958—March-April and May-June. We can still supply back issues of some other dates. We also now have more copies of the January-February and March-April issues of 1963! So: you, who did not get your copy, please write for it NOW before they are gone!!

GAZETOJ RICEVITAJ (julio 11an 1963)

Bulteno de EK de Los Angeles, junio; Pli 2 (junula gazeto de EKLA); **Boletín** (hispania), enero-febrero; **Edukado Internacia**, 18 majo; **Intersteno**, januaro; **The Australian Esperantist**, Jan.-Feb.; **Looking Ahead** (= Rigardante Antaŭen) (porinfana pacula gazeto) (havas artikolon pri Espo en ĉiu numero), unuaj tri numeroj: jan., feb., marto; **Kuriero** (de Studenta E-o Klubo, Kleriga Konversacia Klubo; Danlando), majo, junio/julio; **La Revuo Orienta**, junio; **Jen-Bulteno** (E-a junularo de NA), junio; **La Ĝusta Vojo**, aprilo-majo; **La Skolta Mondo**, printempo 1963; **La Gazeto**, 1 februaro; 15 februaro; **La Verda Lumo** (Wash., DC); **Internacia Ĵurnalistoj**, januaro/marto; **Dansk E-Blad**, maj.; minutes (gazeto de "Nationwide" (= tutnacia) asekursistemo komerco): letero de Mark Starr, june; **Universala Revuo**, junio; **Heroldo De Esperanto**, 16 majo; **Sennaciulo**, junio; **Jugoslavia E-isto**, marto-aprilo; **El Popola Ĉinio**, No. 3, 1963; **Nuntempa Bulgario**, marto; **Esperanto**, junio; **Orbito** (usona memstara bulteno pri diversaj informoj), serio, No. 3; No. 4; **Germana E-Revuo**, junio; **La Espero** (Svenska E-Tidningen), januaro, februaro, marto, aprilo, majo; **Amikeco** (Triŝtata E-Bulteno: or. Ohio, okc. Pensilvanio, norda Okc-Virginio), ELNA-Kongreso numero, junio; **Oomoto**, marto-aprilo.

NOVA DUMVIVA

MEMBRO

Cecilia Peterson, Downey, Cal.

R E C E N Z O J

Emile Peltier, Apostolo de Katolika Esperantismo, de N. G. Hoen. Eldonis Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 1963. 45p., broŝ. Prezo: 6 steloj.

La unua broŝuro en nova katolika serio (Kristana Kulturo—IKUE-Kajero N-ro 1), post kiu ankoraŭ du aliaj broŝuroj aperis. 1963 estas jubilea jaro de la esperantista katolikismo, ĉar en oktobro, 1903, komencis aperi la gazeto *Espero Katolika*. Nur sep jarojn poste oni fondis la Internacian Katolikan Unuiĝon Esperantistan.

Emile Peltier havas honoran lokon, ĉar li fondis kaj ĝis sia morto en 1909 redaktis la katolikan gazeton. Krome, pro lia iniciato fondigis la internacia societo. Sacerdoto katolika, spirite tre ekumena, Emile Peltier esperis reunuiĝon de la kristanaj eklezioj, kaj eĉ proponis planon de kunlaboro de kristanaj esperantistaj pastroj el la diversaj eklezioj, cele al iama esperantbaza kuniĝo de la ekleziaro. De la komenco, li celis ke lia gazeto estu voĉo ne nur de la romkatolika eklezio sed ankaŭ de la tutmonda eklezio, kaj evidente li komprenis la vorton "katolika" laŭ tiu (historie ĝusta: greke kat-holikos = ĝenerala) senco. Kvankam la I.K.U.E. kaj la gazeto *Espero Katolika* tamen iĝis romelezia voĉo, ili ankoraŭ nun konservas liberalan spiriton kaj kunlaboremon admirindajn.

La biografio pri Emile Peltier estas inspira verko: ĝi plifortigas en ni la senton ke malgraŭ grandaj problemoj kaj senĉesa baraktado, oni povas sukcesi, kiam temas pri io vere utila en la mondo.

Skolta kaj Tenduma Terminaro, red. J. K. Hammer. Eldonis Skolta Esperantista Ligo, 1963. 20p. plus ilustraj folioj.

Leksikonoj urĝe estas bezonataj. Estas malfacile decidi, ĉu pli malagrablas devi diri al lernanto aŭ amiko, "tiu termino ne ekzistas en Esperanto," aŭ mem sperti la

fakton, ke pri multaj aferoj oni ne povas paroli ĉar tiutemaj terminoj ne ekzistas. Kiel redaktoro mi ofte ricevas leterojn de personoj, kiuj demandas kiel traduki tiun aŭ alian terminon; aŭ kiuj petas ke mi publikigu listojn de vortoj kun tradukoj, kiujn oni ne trovas en la leksikonoj. Sed simple fabriki vortojn ne utilas: rekomendi al oni ke uzigu terminojn neniam antaŭe viditaj en la lingvo kaj de neniu komprenataj estus malutile.

La plej sana solvo de la problemo estas tiu nun aplikata pli kaj pli: la aperigo de specialaj fakvortaroj, sub pli-malpli oficialaj aŭspicioj. Kiam kompetente preparitaj, tiaj leksikonoj kaj permesas trovi bezonatan vortprovizon, kaj garantias ke personoj en alia parto de la mondo povos (akirinte la saman leksikonon) kompreni. UEA per sia Jarlibro, dua parto, de jaroj helpas publikigante fakvortarojn. Kaj pluraj fakgrupoj mem pretigis/as proprajn eldonojn. Nun ni havas unu tian: leksikonon preparitan por la skolta grupo. La leksikono ne estas nur teoria, aŭ arbitre farita. Ĝi originis pro speciala bezono de jam ekzistanta kaj aktiva grupo, kaj estas bazita sur terminara uzado kiu jam havas tradicion.

La plano de ĉi tiu libreto estas simpla, kaj celtrafa. La plej granda parto prezentas terminojn ne laŭ sekaj listoj, sed en la kadro de priskribo. Tiel, legante kontinuan artikolon pri la skoltado, oni samtempe renkontas la terminojn. Tiu aranĝo havas avantaĝon specialan: la libreto povas servi ankaŭ kiel ekspliklibro pri skoltado, al personoj kiuj volas iom kompreni la sistemon. Kelkaj listoj tamen ekzistas, aranĝitaj laŭ temo: sub titolo "tendumi" oni trovas terminojn tendajn, kc. Tre utilaj estas la bildoj. La diversaj nodoj, la partoj de biciklo, — tie mi trovas tradukon por "gears" kiu fine kontentigas min: rapidumo. Tiun terminon oni ja transprenu ankaŭ por aŭtoj kaj aliaj aparatoj. — tendarobjektoj, hejt/lum-iloj, tendoj, ricevas specialajn bildpaĝojn.

Malfayore kritiki ĉi tiun broŝuron mi ne povus. Ĝi estas ideale preparita. Senescepte la terminoj elektitaj al mi ŝajnas uzindaj.

La Vivo de Zamenhof en Bildoj, 20paĝa katalogo preparita de Henk Thien, Uiterwaardenstraat 12, Amsterdam, Nederlando. Ĉi tiu estas listo de 260 diversaj fotoj pri Zamenhof, aranĝitaj kronologie. Temas ne nur pri zamenhofbildoj mem, sed ankaŭ pri rilataj aferoj, ekz. domfotoj, familifotoj, kc. La katalogo estas nur listo; oni povas aĉeti la bildojn, laŭ prezo varianta inter 2.4 kaj 4.8 steloj depende de la grandeco dezirata.

La kataloginto ankaŭ apelacias ke oni sendu al li zamenhoffotojn por pligrandigi kaj kompletigi la kolekton. La katalogon eldonis CED de UEA.

La Fratularo por Reakordigo, 4 paĝa faldfolio, havebla ĉe 9 Coombe Road, New Malden, Surrey, Anglujo; ĉe K.E.S., kc. La F.O.R. estas anglalingva grupo, ĉefe en Usono kaj Anglujo, inspirita de la kvakera movado. Ĝi celas apliki kristanajn doktrinojn al la socia vivo. Ĉi tiu folieto informas pri ĝiaj karaktero, celo, kaj espero.

La Germanaj Orientaj Teritorioj: Eŭropa Problemo. 48 paĝa ilustrita broŝuro sen nomo de eldonisto.

La broŝuro estas lukse preparita, kun multkoloraj presado kaj ilustraĵaro. Ĝi pridokumentas la historion kaj aktualan staton de teritorioj ceditaj al Pollando post la dua Mondmilito, lamentante la cedon kaj indikante deziron ke ili revenu al la (okcident) germana popolo. De la pola flanko jam konataj estas diversaj broŝuroj pri la sama teritoriaro.

Ne estas al ni diskuti la juran problemon ligitan al la afero. Sed unu demando konstante revenas al niaj mensoj; ĉu ne estas eksterordinare infanece, eĉ idiote, ke disputado pri grundpecoj tiel rolas ne nur en internacia politiko sed (ĉefe) en la praktika vivo de homoj?

Cent Jaroj de Matica Slovenská, de A. Matovcik kaj P. Liba. Eldonita de Matica Slovenská, Martin (Ĉekoslovakujo), 1963. 30 mimeografitaĵa paĝoj.

La Matica Slovenská estis ĝenerale kultura institucio, respondeca pri intelekta unuigo de la slovakaj regionoj. Post la komunistiĝo de Ĉekoslovakujo, la kampo de la M.S. grave malgrandiĝis, tiel ke nun ĝi estas esence nacia biblioteko. Per rapida kaj relative objektiva skizado, la broŝuro informas pri la historio de la organizo. Al studentoj de la tiulanda historio ĝi bone servas.

Homo kaj Kosmo, a new quarterly popular science magazine. Published by the Zagreb Astronomical Observatory, at the address: Kroatia Natursciencia Societo, Zagreb, Illica 1/III, poŝtfako 165, Jugoslavio. \$1.00 yearly.

As might be expected, since published by an observatory, the first two issues of this magazine are principally concerned with popular astronomy, although the editors are open to other scientific fields as well. From the colorful cover (showing a rocket ship taking off for outer space) through a series of well illustrated articles, the reader is caught and held, almost enchanted. Artificial satellites and space travel, which only five years ago surprized and awoke an unexpected world, provide the theme for several articles. General information fills in the background for those of us who have not been able to study astronomy as such. There is even space for short sketches of amateur astronomy groups, including in the second issue, a page devoted to the San Mateo (California) group. We think our readers might themselves like to read what the Californians are doing, so we are reprinting that page elsewhere in this issue of the Esperanto Review.

School groups might find this new magazine quite profitable. Astronomy is a truly international subject, one of the few which depend on international cooperation for their very existence. Esperanto provides a thoroughly practical means of contact between amateur and, of course, professional astronomers scattered around the world. For those whose interest in astronomy is less active, but who like to keep abreast of current events, **Homo kaj Kosmo** can also be recommended.

INFORMOJ EL LA AMIKAJ GRUPOJ

Astronomia societo San Mateo

La San Mateo Astronomia Societo de San Mateo, Kalifornio, Usono (proksima al San Francisko) formis la komitaton kiu prizorgos kontribuojn al la nova esperanta revuo »HOMO kaj KOSMO«. La komitato opinias ke la alvoko de la jugoslavaj samideanoj permesas partoprenon en gravaj movadoj ekster la sfero de astronomio. Ĝia partoprenado estos bazita sur la jenaj ideoj:

1. Esperanto celas universalan interkompreniĝon; 2. Bone konate estas ke astronomoj, kiel grupo, ne estas limigitaj pro naciaj bariloj en siaj komunaj streboj; 3. Esperanto kaj astronomio estu kunligitaj; 4. Kune ili povas labori efike ĝis kosma vidpunkto por antaŭenigi la interkomprenon kaj harmonion inter la popoloj de la mondo.

La San Mateo Astronomia Societo estis organizita antaŭ du jaroj de kvar junuloj dekelk-jaraj. Depost tiam ĝi grandiĝis ĝis membreco de pli ol 80 homoj de diversaj aĝoj kaj profesioj, ligitaj per la reciproka intereso pri astronomio.


Ĉiumonataj kunvenoj, malfermitaj al la publiko, programas prelegojn de membroj pri iu temo de astronomio, diapozitivoj aŭ filmoj, kaj kutime oni aŭdas prelegon de iu famekonata astronomo. Dum la lasta jaro la membroj ĝuis la privilegion aŭdi tiajn homojn kiaj d-ro Dinsmore Alter, fama priluna aŭtoritatulo, kaj d-ro William P. Bidelman de Lick-Observatorio.

La Societo kondukas ankaŭ aliajn aktivecojn. Ekzemple »stelfestoj« (ekskursoj por rigardi la stelojn) okazas ĉiumonate sur montetoj kie estas bonegaj kondiĉoj por ĉiela observado. La membroj de la societo kaj iliaj gastoj kunportas proprajn teleskopojn por la vespero — kelkiuj restas dum la tuta nokto por observi la mirindaĵojn de la ĉielo.

Alia ĉiumonata aktiveco estas veturado al iu fama laboratorio, planetario aŭ observatorio.

Komitatestro de Kulturo-
Interŝanĝ-Komitato

CARL SMITH



La junaj astronomoj el San Mateo

C. Stanley Otto:

Skolta Ligo 1963

I. Nord-Amerika Agado

A.—Kanado

Frue en 1960 skoltaj profesiuloj en la provinca skoltkonsilaro de British Columbia, estrate de Dennis R. Flawith, fondis la Kanadan Sekcion de S.E.L. kaj malrapide komencis varbi lokajn aktivajn esperantistojn de la provinco prizorgi detalojn de propagando kaj instruado inter skoltoj rondoĵoj. Dum du jaroj progreso estis ja malrapida sed limigita.

Vorton ricevis la internacia sekretario de la Skolta Esperantista Ligo, S-ro C. Stanley Otto, en 1962 de loka Montreala esperantisto ke la Montreala distrikta komisaro Phil Zukerman, deziris starigi Esperanto-kurson tie. La esperantisto kiu estas najbaro al li estas U. P. Ronald, longdaŭre dediĉita kaj Montreala reprezentanto de Esperanto. Pasigante libertempon en Kebeko, Gesroj C. S. Otto vizitis ambaŭ virojn kaj faris planojn havi elmontraĵon de Ligaj kaj Esperantaj temoj ĉe distrikta kamporeo. Dum la aŭtuno S-ro Otto kune kun S-ro Zukerman kaj Ronald, kaj kunlabore de la Montreala Esperanto-Klubo prelegis antaŭ multcentaj personoj de la skolta kaj ĝenerala publiko ĉeestante la kamporeon inkluzive la internacian skoltkomisaron de Kanado, Earl T. Moore.

Kelkajn semajnojn poste, J. Courtney White, nova prezidanto de la Kanada Sekcio sendis leteron al la internacia fako de la Kanada skoltinstanco petante rekonigon kaj aprobon de Esperanto kaj la Skolta Esperantista Ligo. S-ro Flawith aliflanke respondis al leteroj de tiu instanco en lia oficejo en Vancouver. La internacia skoltkomisaro post konversacioj kun la Montreala skoltgrupo, proponis rekonigon de S.E.L. ĉe la grava nacia skoltkomitato, kaj kelkajn tagojn poste, S-ro White ricevis la ĉesuban epokfarantan leteron:

Kara S-ro White:

Mi tre feliĉas kaj kapablas informi vin, ke la Nacia Konsilaro de Knabaj

Skoltoj de Kanado (Boy Scouts of Canada) ĉe sia kunveno en Montrealo lastan semajnon (la 1-an de februaro 1963) donis formalan rekonigon kaj aprobon al la Kanada Sekcio de la Skolta Esperantista Ligo. La Konsilaro ankaŭ donis aprobon al Esperanto kiel kvalifika lingvo por la insigno de Tradukisto. Mi scias, ke vi interesiĝos lerni, ke antaŭ 30 jaroj la postuloj de tiu ĉi insigno inkluzivis Esperanton kaj ian ajn lingvon. Ie dum la intertempaj jaroj la postuloj de la insigno evidente reviziigis kaj Esperanto eliminigis kiel ankaŭ konversacio en la surdmuta alfabeto, aŭ legi kaj skribi en brajlo. Ni deziras al vi kaj al la Skolta Esperantista Ligo ĉian sukceson.

Sincere via,

B. H. MORTLOCK

Administra Komisaro-Interrilatoj
Boy Scouts of Canada.

La rezulto estas, ke Esperanto-artikoloj nun aperas en diversaj oficialaj skoltgazetoj kaj Esperanto-kurso okazis en Montrealo inter 16 skoltoj kiu intencis ĉeesti la Mondjamboreon en Grekujo dum aŭgusto 1963. Pluaj rezultoj en membreco en la Ligo montras ke skoltestroj kaj lupidestroj trans Kanado multe interesiĝas pri Esperanto kaj ĝia uzo en mondskoltoj aferoj. La Kanada Sekcio en nur kvar monatoj kreskiĝis ĝis cent membroj kaj daŭrigas sian fortan kreskon. Problemoj tamen ekzistas. Tiel multaj novaj membroj ekaperis, ke estas grava bezono fari personajn kontaktojn de spertaj esperantistoj helpi la Kanadajn skoltestrojn pri gramatiko kaj instruteknikoj. Esperantistoj volontaj helpi en Kanado, estas urĝe petataj skribi al S-ro J. Courtney White, 7806 Pr. Albert St., Vancouver 15, B.C. aŭ la Nacia Reprezentanto Dennis R. Flawith, Box 167, Crescent Beach, B.C. Estas signife rimarki, ke se ĉiu skoltestro povas ricevi personan viziton, estas bona ŝanco varbi de kvin ĝis 50 novaj junaj personoj al la Esperanto-movado de ĉiu trupo!!!

B. Usono

Ekde sia fondiĝo en Januaro 1957 la Usona Sekcio de la Skolta Esperantista Ligo sukcese trapasis multjarajn malfacilecojn resti ankoraŭ la plej granda junulara organizaĵo en la Nord-Amerika kontinento. Pere de la malavara helpo de esperantistaj subtenantoj la Sekcio nun fieras anonci, ke ĝia kresko ŝajnas esti eĉ pli forta inter skoltaj rondoj ol en antaŭaj jaroj. Ĝi nuntempe nombras 120 membrojn de multaj landpartoj.

Eble la plej granda el ĉiuj sekcioj en la Skolta Esperantista Ligo, ĝia plej grava problemo estas: allogi la skoltajn profesiulojn kaj gajni aprobon de la ĉefskoltkonsilaro. Ni, la administrantaro, vere konsentas, ke la Sekcio devas unue atingi ĝis 300 membroj antaŭ ol ni povas renkonti respondeculojn en la nacia oficejo. Ni do tiun ĉi jaron faras grandegan pruvon varbi skoltojn kaj skoltestrojn krom esperantistaj subtenantoj.


Ankaŭ kiel la Kanada Sekcio, nun ĉar pli da skoltestroj lernas la lingvon Esperanto, necesas, ke ili ricevu helpon de esperantistoj pri gramatiko, kaj la direktoro ŝarĝe de pedagogiaj servoj: Thomas Haxby, Route 2, West Fork, Arkansas, urĝe petas, ke esperantistoj simpatiaj pri instruado antaŭ junuloj skribu al li. La abundo de novaj skoltoj en la Ligo ankaŭ postulas ke la ĝenerala esperantista publiko serioze pripensu subtenon. Unu subtenanta membreco ebligas la administrajn elspezojn de 2-3 skoltoj en la Sekcio. La jara subtenanta abono estas unu dolaro aŭ kvinjare kvar dolaroj. Interesuloj, turnu vin al la nova administra direktoro de la Usona Sekcio: Stuart P. Seidel, 915 E. 48th Street, Brooklyn 3, New York.

II. Eŭropo

Ankaŭ frue en 1962 la dediĉita esperantista skolto Kurt van Rossem Hulstijn el Nederlando, nun Eŭropa S.E.L. - Reprezentanto, sukcese varbis la Nederlandan ĉefskoltestron E. J. H. Volkmaars starigi Esperanto-Skoltkamporeon dum la somero de 1964 en Nederlando invitante skoltojn de tuta Eŭropo. Al S-ro Volkmaars la kamporeo estas granda eksperimento vidi kiel efike Esperanto povas forigi lingvo-barojn. Tiu ĉi grava evento vere decidus la eston-

tecon de la Skolta Esperantista Ligo en Eŭropo.

Dumtempe Eŭropa Esperanto-kampanjo nun klopodas inter skoltoj gazetoj trans la kontinento interesi skoltojn lerni Esperanton kaj ĉeesti tiun eventon. Estas la espero de la Centra Komitato de S.E.L., ke la kamporeo estos sufiĉe proksima al la tempo de la Universala Esperanto-Kongreso (kiu ankaŭ okazos en Nederlando en la somero 1964) por vidi Esperanton en agado sur la monda ebena. Laŭ ĝisnunaj informoj skoltoj en Nederlando, Britujo, Germanujo, kaj Skandinaviaj landoj fervore studas Esperanton.



Armand Su, kun Carol

Armand Su:

Al Carol

Ĉe mia kuseneno via leter' kuŝas,
kiu flustras al mi pri la sopiro.
Via am-konfes' min vere kortuŝas.
En ĉiu vort' sin kaŝas la respiro,
kiu mian vivon tenere karesas
per la nevenkebla magia forto.
Al vi, kara knabino, mi promesas:
mi amas vin, kaj amos ĝis la morto!
(El lia unua preparita Esperanta
poemaro, 1957-1962.)

ESPERANTO in the U.S.A.

GROUPS

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information:

California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto League (Mrs. William Schulze, 410 Darrell Road).

Los Angeles: Esperanto-Klubo de Los Angeles (Wm. W. Glenny, 2705 Carlaris Road, San Marino).

Napa: Napa Esperanto Club (Mrs. D. C. Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (P.O. Box 11564, Station A).

Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (J. Q. Rickey, 2667 17th St., Sacramento 18.)

San Diego: Esperanto Society of San Diego (Frances E. Helmuth, 5615 Beaumont Avenue, La Jolla (San Diego)).

San Francisco: Esperanto-Societo de San Francisco (SSgt. Barbara D. Colt, 580C Lendrum Road, Presidio of San Francisco).

San Gabriel Valley: Blind Study Group (Mrs. Phillips Neuman, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: (Mrs. Blanche Parker, 515 25th Street.)

D.C.:

Esperanto Club of Washington (Sergio Docal, 2947 Tilden St., N.W., Washington).

Illinois:

Chicago: Esperanto Society of Chicago (Mrs. J. N. Denison, 17958 Homewood Ave., Homewood).

Massachusetts:

Cambridge: Harvard Esperanto Club (Quincey House, Box 8, Cambridge 38).

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street, Greenfield).

Michigan:

Ann Arbor: (Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale).

Missouri:

St. Louis: Esperanto Societo de St. Louis (John Sabin, 9 Princeton Place, University City 30).

Montana:

Missoula: Esperanto Study Group (Bob Davis, 1721 Helen).

New York:

New York: The Esperanto Society of Greater New York (50 Overlook Terrace, New York 33).

New York: Esperanto-Klubo de Novjorkurbo (Dr. Julius Balbin, 340 Riverside Drive, Penthouse 2, New York 25).

New York: Esperanto Study Group (Frances Leshner, 4 West 28th Street, New York 1).

New York: Staten Island Esperanto-Pondo (John Kailenta, 83 Kenball Ave., Staten Island 14).

Oregon:

Corvallis: Oregon State University Esperanto Group (Jean Ann Trout, 507 West Hall, OSU).

Medford: Rog-vala Esperanto-Ligo (S-ino Bettie L. Buonocore, 109 South Oakdale).

Oregon City: Oregon City Esperanto Group (Mrs. Lawrence Winkleman, 4203 S.E. Rothe Road, Milwaukie 22).

Portland: Esperanto-Societo de Portland (ESPO). (Mrs. Evelyn Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).

Portland: Multnomah Esperanto - Stud - Grupo (Tomaso Davidson, 3434 S.W. Marigold St., Portland 19).

Pennsylvania:

Allentown-Bethlehem: Esperanto Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Meadville Esperanto Society (Barbara Eberhardt, 681 Hickory St.).

Pittsburgh: Esperanto-Klubo de Pittsburgho (Donald H. McClellan, 333 Macassar Drive, Pittsburgh 36. Phone: (412) 655-7704).

Tri-Stata Esperanto-Informejo and Tri-Stata Esperanto-Bulteno (2736 Locust Drive, Bridgeville).

Texas:

Houston: Esperanto-Klubo de Houston (Edward F. Lacy III, 6923 Schley St., Houston 17).

Telefono: WA-6-5702

Washington:

Seattle: (Vincent Griffith, 8556 37th Ave., S.W.).

Spokane: (H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave.).

Tacoma: (Ruth Culberg, 1912 N. Monroe).

Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St.).

National Groups:

Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Junularo Esperantista de Nord-Ameriko (JEN) (Richard B. Kollin, Apt. 4a, 30 Avenue B., New York 9).

Book Dealers:

Esperanto League Book Service, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Shorey Book Store, 815 Third Ave., Seattle 4, Washington.

Esperanta Libroservo, 6361 Elmburst Rd., San Diego 20, California.

All the book dealers accept mail orders.

REPREZENTANTOJ DE ORGANIZOJ

Ci tiu listo tute ne indikas konekton kun E.L.N.A.

Kristana Esperantista Ligo Internacia: David Richardson, RFD Box 81, Eastsound, Washington.

Internacia Katolika Unuigo Esperantista: Eleanor McGrogan, 2109 Parkwood Dr., N.W., Warren, Ohio.

Kvaka Esperantista Societo: Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

Unitara Universalista Esperanto-Societo: Jim Deer, 12946 N.E. Hancock, Portland 30, Oregon.

Universala Esperanto-Asocio, Heroldo de Esperanto, kaj Universalista Ligo: Donald Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, California.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas.

Internacia Naturista Organizo Esperantista: Leif Heilberg, 1801 Page St., San Francisco 17, California.

Se la supraj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu informi:

S-ino Dorothy Holland (Estro de la ELNA

Membrea kaj Organiza Komitato),

1976 Greenview Drive,

Fayetteville, Arkansas.

RESPONDOJ POR "LERNU VORTOJN"

1. a
2. c
3. c
4. ĉ
5. a
6. a



THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC.



invites you to join in the work of promoting Esperanto as a member of the League. You will receive The North American Esperanto Review, and as an associate member of the Universala Esperanto-Asocio will be entitled to the services of its world network of local and specialist delegates.

The Esperanto League is the only American organization affiliated with the neutral world-wide Esperanto movement as an official "landasocio" of U.E.A.

Esperanto League for North America, Inc.
808 Stewart Street,
Meadville, Pennsylvania.

I enclose a check/money order for \$.....

Please enroll me as a member in the following category (check which):

- Student Member (under 21; my age is), \$3.
- Regular Members, \$5. Joint Members*, \$7.
- Sustaining Member, \$10. Patron Member, \$20.
- Life Member, \$100. Subscription only, \$3.

*Man and wife; receive one subscription.

NAME:.....

ADDRESS:.....

CITY:..... STATE:.....

DE ALASKO AL MEKSIKIO:

La gazeto por ĉiuj esperantistoj sur la nord-amerika kontinento estas

LA NORD-AMERIKA ESPERANTO-REVUO

Jarabono: \$3 (40 steloj)

Abonu ĉe ELNA
aŭ via landa asocio

ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Canada
Return and forwarding
Postage guaranteed

